


CERBE kaj KORE



KULTURA SUPLEMENTO
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 117

N-RO 18 (86), FEBRUARO 2021

Enhavo

Originala poezio

Mikaelo Bronŝtejn

“Protektu sorto tiun, kiu pekis”	3
“Antaŭ jardekoj la landlimoj”	3
Mia kateĉjo rufa	4

Klara Ilutoviĉ

“Nova Jar' bonan pluvivon donacu”	5
Bonaj sonĝoj	5
Kion fari kontraŭ <i>covid-o</i> ?	6
Aŭguroj	6

Datrevenooj de la rusa kulturo

130-jariĝo de Osip Mandelŝtam

<i>Raja Kudrjavceva</i> . Memortabulo al Mandelŝtam en Jekaterinburgo	7
--	---

<i>Osip Mandelŝtam</i> . La decembristo. Trad. Mikaelo Bronŝtejn	8
---	---

25 jaroj post morto de Iosif Brodskij

<i>Mikaelo Bronŝtejn</i> . La lasta Brodskij	9
<i>Iosif Brodskij</i> . La palilio. Trad. Mikaelo Bronŝtejn	11

Tradukita poezio

<i>Konstantin Simonov</i> . Knabo. Trad. Aleksandro Mitin	16
---	----

Valerij Brjusov. Malhuna vikingo, Trad, Klara Ilutoviĉ	17
--	----

Historio kaj nuntempo

<i>Tatjana Auderskaja</i> . Pri vino, vinfarado kaj vinfaristoj	19
---	----

Libroj

Igorj Aretano. TARAFA	23
-----------------------	----

Miĥail Korotkov. <i>Io devas okazi</i> : Rakontoj, fabeloj, pripensoj	25
---	----

Said Baluĉi. Antologia skizo de la persa literaturo	26
---	----

Konkursoj

“KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin”	27
--------------------------------	----

Humuro

Stepano N. Oftuŝkoj	27
---------------------	----

<i>Nikolao Neĉajev</i> . Muzo de Esperanta poezio	28
---	----



Originala poezio

Mikaelo Bronštejn, Tihvino

Protektu sorto tiun, kiu pekis
Sed poste turmentadis sin rimorse,
Kiun la koro al pentado vekis,
Pro l' senta pur', ne pro rutina mor'; se
La jaroj draŝas, premas senkomplete,
Dolorojn portas ĉiu nova hor',
Li firme staras plu sur sia pado
Kaj paŝon eĉ ne cedas al rumor'.
Protektu sorto tiun, kiu pene
Sed kun obstin' al celo nobla iras,
Kaj ĝin atingas per laboro, se ne
Rezignas, stumblas, fuĝas aŭ martiras.
Kaj, atinginte, tuj elektas novan
Sinceran, noblan celon por impet',
Sen stulta zorgo engravuri l' nomon
En la eminentula alfabet'.
Protektu sorto tiun, kiu amon
Al amatino donas senrezerve,
Eĉ sen gloragoj okulfrapaj, tamen
Sincere, ĝoje, tutanime serve.
Kaj, se estingas amon tempokuro,
Por ĉiam gravuriĝas en la sin'
Cikatro – de l' mortinta amo spuro,
Kiu dumvive plu turmentos lin.
Pensante nun pri mia vivo knara,
Mi diras, - ne orgojle, - savu Di':
- Ho, mia sort', ne estu do avara
Pri la protekto foje eĉ por mi.

24.01.2021

Antaŭ jardekoj la landlimoj
Degelis. Iĝis pli proksimaj
Multjaraj korespondamikoj,
Ankaŭ la novajn trovis mi, kaj
Ofertis simplajn ĝojojn ame
La amikinoj korbalzame.
La sunon reradiis ĉio
En la varmega Valencio,
Sed varmis ankaŭ kluba festo,
Antaŭ Kristnasko en Triesto,
Kaj la kantado en trankvil'

De la printempa Herouville.
... Ve, daŭras, daŭras la hejmsido!
Nun konsoleton serĉas mi do
En polva mond' albuma mia –
Ĝis fin' de l' fio pandemia.
10,01,2021

Mia kateĉjo rufa

Mia kateĉjo rufa
dormas dum vintraj tagoj.
Post la somera viglo
logas kviet', trankvilo.
Kaŝas en varmo pufa
sin de l' eksteraj blagoj
mia kateĉjo rufa.
Mia kateĉjo rufa,
sep kilogramojn peza,
tuj kun osced' vekigās,
de-sur kusen' leviĝas,
trotas kun spiro snufa
al bongustaj' tagmeza –
mia kateĉjo rufa.
Mia kateĉjo rufa
nokte laŭ ĉambroj vagas.
Estas la nokt' por movo,
serĉo, embusko, trovo.
Do en impeto blufa
boton ĉe l' pord' atakas
mia kateĉjo rufa.
Mia kateĉjo rufa
ĉiujn dormantojn vekas!
Vanas embusk', impeto –
mankas en hejm' museto!
Per okulparo gufa
streĉe krepuskon strekas
mia kateĉjo rufa.
Mia kateĉjo rufa,
saltu, miaŭu, kuru!
Ludu kun mi dum tago
vi post la nokta vago.
Nokte kun mildo mufa
vi apud mi murmuru,
mia kateĉjo rufa...
20.12.2020



Barono - Majna preciona kato (Maine coon) el Krasnojarsko. Foto de la mastrino - Evelina Sokolova



Klara Ilutoviĉ, Elektroŝtalo

Nova Jar' bonan pluvivon donacu,
Vivon en ĝoj' sen tim',
La jartorent' sian bonon ne lacu
Sendi al la anim'!

Forvaporigu minacoj kaj krizoj,
Venu al ili fin',
Kaj nova jar' nur per bonaj surprizoj
Ĝojhumorigu vin!

Sana kaj paca viv', ĉiu vivbono
Benu vin je l'favor',
Ĉiujn virusojn, en krono, sen krono,
Nova jar' pelu for!

Nova jar' fluu amike, impona
Tuj ekde januar',
Nova jar' estu sendube pli bona,
Ol la pasinta jar'!

Bonaj sonĝoj

Bono povas en sonĝoj resti,
Ĝojgante plu en proksim'.
Bono emas pli firme esti
konservata en la anim'.

Bon' laŭ sonĝoj ofte navigas,
Ke ne velku ĝia arom',
Ankaŭ sonĝe rememorigas
Iu bon' pri si al la hom'.

Dormo foje permesas vidi
Gravan bonon el la iam',
Agordante al preto fidi
Tiun bonon el la sonĝoflam'.

En la viv' ne nuras malbono
El atakoj, batoj kaj rongĝ',
Kaj premata hom' sen rezono
Rememoru bonon de l'sonĝ'!

Renaskiĝas varma espero,
Bonas tio kaj tio ĉi!
Al mi sonĝe venas APERo –
Kiel bone estis dum ĝi!...

2021

Kion fari kontraŭ *covid-o*?


Kiel sin defendi dum *covid*¹-o?
Multon oni diras – kio veras?
Ŝanceliĝas kaj velkemas fido
Al la bono. L' vivo plu danĝeras.

Kio malutilas kaj utilas?
Kion do plu fari aŭ ne fari?
Estingiĝo de *covid* ne brilas –
Ĉu nur hejme siajn fortojn ŝpari?

Mutacie la viru' rapidas
Jam okupi sian novan lokon.
Kiu do vakcin' ĝin vere bridas?
Ĉu porlonge? Sen venigi ŝokon?

Maskoj, gantoj, televid' kaj revoj –
Ve, ne multe por sin gardi restas.
Tamen vivas eksterhejmaj devoj –
Simple l' vivo. Estu kio estas.

Nur leter, telephone, rete
Renkontiĝas nun esperantistoj.
La renkontoj vokos helpoprete
Kaj atendas tra *covid*-rezistoj.



Aŭguroj

Mi aŭdis ĝojogan aŭguron
Pri jaro la dudekunua.
Promesas ĝi ties naturon
Por sano okazi bonflua.

Aŭgur' povas esti erara
Kaj ekkonsciigi eplagon
Aŭ per implekseco bizara
Provoki fatalan misagon.

Por kio do tremi kaj cedi
Al, eble, klaĉaj' malĝojdona?
Ĉu ne preferindas ja kredi
Al ies aŭguro pli bona?

Kaj kie 'stas vere kredinda
Pro l' maga talent' aŭguristo?
Ĉu estas li, kiel ni, blinda
Pri lum' de la onta ekzisto?

Ni vivu laŭ simplaj mezuroj
Por pensi, heziti, kompreni
Kaj kredu al bonaj aŭguroj,
Helpantaj malbonon elteni/

¹ *Covid-19* estas angla mallongigo de COronaVirus Disease 2019, Kronviroza malsano. Esperanta mallongigo estas “kovim”.

Datrevenoj de la rusa kulturo

130-jariĝo de Osip Mandelŝtam

Memortabulo al Mandelŝtam en Jekaterinburgo

La 15-n de januaro estis la 130-a naskiĝdatreveno de Osip Emiljeviĉ Mandelŝtam - unu el la plej grandaj poetoj de la XX-a jarcento. En multaj urboj de Rusio pasis diversaj kulturaj aranĝoj, dediĉitaj al la poeto: poeziaj vesperoj en teatroj kaj ekspozicioj de liaj libroj en bibliotekoj kaj muzeoj, publikaj legadoj de liaj poemoj antaŭ la monumentoj de O. Mandelŝtam en Vladivostok, Voroneĵ k.a. lokoj. Al tiu ĉi jubilea dato rusiaj kaj eksterlandaj muzikistoj registris muzikan bitalbumon kun 21 muzikkompozicioj je verkoj de la poeto sub la nomo “Soĥrani moĵu reĉj navsegda” (“Konservu mian parolon por ĉiam”). La iniciatinto de la projekto estis rusia reĝisoro Roman Liberov, kaj en la kreado de la albumo partoprenis Leonid Agutin, Ilja Lagutenko, Oxxxymiron, Noize MC, muzikgrupoj “Kurara”, “Sansara” k.a.

Ankaŭ en Jekaterinburgo nun estas la memorloko, ligita kun O.E.Mandelŝtam. Estas konate, ke dum la veturado al sia vica ekzilejo en Perma provinco Osip Mandelŝtam kaj lia edzino Nadeĵda Mandelŝtam pasigis unu tagon en Sverdlovsko, kiam ili restis sub la gardo de du sentineloj en la sverdlovskia fervojstacidomo.



Antaŭtage de la 130-a naskiĝdatreveno de la poeto tiu ĉi historia fakto estis eternigita en la stacidomo de Jekaterinburgo per memorsigno el bronzo.

Menciindas, ke antaŭ du jaroj mi ĉeestis la malfermitan renkontiĝon, okazintan en la konferencejo de Jelcin – centro, kiam la invitita kunaganto el moskva centro de memoro pri O.Mandelŝtam montris videojn pri la diversurbaj memorlokoj, ligitaj kun la poeto, kaj komentis ilin; poste okazis la pridiskuto de la preparlaboroj por instali la memortabulon pri la poeto en Jekaterinburgo, kaj tiam lokanoj lamentis pri la nesufiĉa monsumo, kolektita por la afero. Tial mi estis tre ĝoja ekscii antaŭieraŭ, ke la bonega ideo pri la memortabulo realiĝis, kaj nun ĝin eblas vidi sur la muro de Jekaterinburga fervojstacidomo.

Raja Kudrjavceva, Jekaterinburgo



Osip Mandelstam (1891-1938)

Декабрист

"Тому свидетельство языческий сенат,-
Сии дела не умирают"
Он раскурил чубук и запахнул халат,
А рядом в шахматы играют.

Честолюбивый сон он променял на
сруб
В глухом урочище Сибири,
И вычурный чубук у ядовитых губ,
Сказавших правду в скорбном мире.

Шумели в первый раз германские
дубы,
Европа плакала в тенетах,
Квадриги черные вставали на дыбы
На триумфальных поворотах.

Бывало, голубой в стаканах пунш
горит,
С широким шумом самовара
Подруга рейнская тихонько говорит,
Вольнолюбивая гитара.

Еще волнуются живые голоса
О сладкой вольности гражданства,
Но жертвы не хотят слепые небеса,
Вернее, труд и постоянство.

Все перепуталось, и некому сказать,
Что, постепенно холодея,
Все перепуталось, и сладко повторять:
Россия, Лета, Лорелея.

1917

La decembristo

"L' senat' pagana estas la atesto, -
Ĉi tiaj kazoj ja ne mortas".
Ĉibukon fumis li, en loza hejma
vesto,
Kun ĝi ŝakludo pli komfortas.

Ne plu glorama sonĝ'. Densej' de
Siberio,
Domaĉo el trabaĵo cedra,
Kaj la ĉibuko por venena lipo lia,
Dirinta veron en la mond' funebra.

Aŭdiĝis bruo de l' germana kverka
ar',
Poloregis en la fia ret' Eŭropo,
Triumfe baŭmis ĉiu nigra ĉevalkvar'
Ĉe la vojturnoj dum galopo.

Kaj foje brulis en la glasoj blua
punĉ',
Kun vasta bru' de samovaro
La rejna amikin' parolas pace nun,
Revanta pri liber' gitaro.

Ankoraŭ sonas ja la vivaj voĉoj de l'
Diskut' pri dolĉa libereco,
Sed l' oferaĵon neas blinde la ĉiel',
Fidindas pli labor' kaj konstanteco.

Miksiĝis ĉio, kaj neniuj diros, ke
En fridiĝanta spontaneo
Miksiĝis ĉio; dolĉas diri re kaj re:
Rusi', Leteo, Loreleo.

Tradukis Mikaelo Bronŝtejn

25 jaroj post morto de Iodif Brodskij

La lasta Brodskij

La 28-an de januaro 1996 Iosif Aleksandroviĉ Brodskij, unu el brilaj rusaj poetoj, se ne la plej brila poeto de la dudeka jarcentoposedanta malsanan koron, forpasis nokte dum dormo.

Naŭ jarojn antaŭe Iosif Brodskij, 47 jarojn aĝa, iĝis unu el la plej junaj Nobelpremiitoj en la literatura branĉo. Kelkaj esploristoj de lia vivo kaj verkoj, el inter la amaso da tiuj, aperinta post lia forpaso, asertas, ke la alta honorigo ŝanĝis la verkmanieron kaj la karakteron de Brodskij. Ke li iĝis orgojla, agresema, memama... Ke el sub lia plumo bagatelajoj komencis aperi pli ofte ol brilaj versoj... Ekzemple, en la artikolo “Ŝoko pro Brodskij” la aŭtorino, S. Tuĉinskaja, jenamaniere raportas pri unu el la lastaj prelegoj de la poeto, okazinta en la fino de 1995, en Palo Alto:

“La salono atentis lin respektplene, kun preskaŭ pia ravo, pardonante tion, kio estus nepardonebla por ĉiu ajn alia persono. Sed li estis malkontenta pri la publiko kaj malkaŝe demonstris tion. Li postulis, ke la publiko prezentu demandojn, sed li respondis tiujn malŝate-incitite, foje venante al evidenta impertinenteco. La demandoj, vere estis ofte sensecaj, malsaĝaj aŭ simple nekonvenaj, kio, cetere, okazas ĉiam kaj ĉie, en iu ajn vespero de simila speco...

... Sen kompato al la aĝo de certa grizhara ŝatanto de Jesenin, li respondis: “Mi preferas samopini kun Aĥmatova, ke Jesenin, ĉefe estis zorgita pri la problemoj, kiuflokan kombi la hartufon, maldekstren aŭ dekstren”.

... Li legis, plejparte, siajn “lastajn” poemojn el la fino de la okdekaj kaj el la naŭdekaj jaroj... Mi kuraĝu emfazi, ke el inter tio, kion li estis leginta al ni tiuvespere, inter absolutaj kaj sendubaj ĉefverkoj, aperis ankaŭ io tute nedigestebla – ia ekstermezure longa, fuŝe elpensita kaj laciga transraciaĵo, elturmentitaj senmelodiaj trukoj, kiujn ne povis savi eĉ lia fama, ensorĉiga, ŝamaneca maniero kante legi siajn poemojn, multfoje priskribita de ĉiuj, kiuj aŭdis lin vive.

Miaopinie, tiuj postmortaj esploristoj volas trompi la legantaron kaj, unuavice, sin mem. Se ili estus seriozaj esploristoj, ili devus scii, ĉar ne eblas konsideri sin serioza esploristo pri biografio de Brodskij sen scio, ke

1. komplikan karakteron Iosif Brodskij posedis ekde la naskiĝo. La ĉefa eco por nomi ĝin komplika estis konstanta kutimo ellabori propran opinion pri ĉio, ĉirkaŭanta lin, kaj senhezita prezento de la propraj opinioj jam maturaj ĉedemande – eĉ se tiuj estu absolute aliaj ol la opinioj stabiliĝintaj, aprobitaj de la amaso. Eĉ se ili estu ofendaj. Lia kolego, eminenta rusa poeto Je. Jevtuŝenko, grave ofendita pro, mildadire, ne tro alta pritakso de siaj verkoj flanke de Brodskij, nomis sian poemon, dediĉitan al la kolego longe post ties forpaso, en 2004 – “Frato mia, malamiko mia”.

2. jam ĉe la ekverko de poemoj, en frua junaĝo, la poeto fidis nur propran inspiron, do tute ne ĉiuj liaj poemoj, eĉ el inter la plej fruaj, estas palise rektasencaj kaj kompreneblaj post la unua tralego. Ja li mem diris poste, ke vera poezio plejparte estas metafizika. Mi ne dirus, ke la famegaj alilandaj poetoj, estimataj de Brodskij, - Auden, Frost, Kavafis, - estas pli kompreneblaj kaj rektasencaj ol li. Sed ja la sama Jevtuŝenko neniam kontestis la superan majstrecon de Brodskij, dirante, ke ekde la frua junaĝo Brodskij posedis “okulfrappe individuon stampon de majstro”.

Konsiderante tion, plus la personan sperton de interkomunikiĝo kun la poeto, mi ne imagas lin speciale orgojla aŭ tro ŝatanta sin mem. La vivon de Brodskij aliĝis ne la Nobelpremio, sed ekloĝo en pli libera mondo post kiam li

estis forpelita el Sovetunio en 1972. Ĝi, la vivo, fariĝis eventoriĉa, inspire verkoplena, kaj pli simpla.

Iĝinte persono finance sendependa, li multe vojaĝis – ne kiel vera turisto, impete saltanta de monumento al monumento kaj de muzeo al muzeo, sed plonge loĝante en ĉiu vizitita punkto. El la vojaĝoj la poeto kunportis ne nur aron da novaj poemoj, sed ankaŭ brilajn eseojn pri la koncernaj lokoj, entenantajn tamen ne nur la neordinarajn priskribojn de tiuj, sed multe pli profundan enhavon. Ekzemple, lia eseo “Vojaĝo en Istanbulon” prezentas elstaran analizon de la eŭropa ekkristaniĝo dum la imperiestro Konstantin....Ĉe tio li ignoris aŭ tute ne trotaksis la amasiĝojn de kolegoj-verkistoj, kien li, nature, tre ofte estis invitata. En la eseo “Dediĉita al la spino”, prezentanta lian vojaĝon al Brazilo, Brodskij argumentite prezentas ankaŭ sian opinion pri la aranĝo, okazinta en Rio. Mi ne dubas, ke pro la opinio, prezentita sube, lin ekmalamis ĉiuj PEN-aŭtoritatuloj:

“Koncerne la kongreson de PEN-Klubo, ĝi estis la aranĝo, despera pro ties enueco, senenhavo kaj foresto de ia ajn rilato al la literaturo.”

La prozaĵoj de Brodskij, verkitaj post la elmigro, plejparte en la angla lingvo, estas aparte elstaraj pro la pensoj kaj nocioj puraj, sinceraj, diafanaj. Tio rilatas ne nur al la privojaĝa esearo, sed (aŭ eĉ pli altgrade) al la profundaj literaturaj analizoj (“Pri unu poemo”, 1981, “La filo de la civilizo”, 1981), al la kortuŝaj membiografiaĵoj (“Malpli ol unu”, 1976, “En la ĉambro kaj duono”, 1985) kaj ankaŭ al la filozofiecaj dramverkoj (“Marmoro”, 1982). En ĉiu el la nomitaj verkoj, samkiel en multaj aliaj, nenomitaj, la vera ŝatanto de literaturo ĉerpos ĝuon kaj spertiĝon.

Kiel la lastan gloragon de la lasta Brodskij mi opinias lian edziĝon. En la fino de la vivo (kompreneble sen scio pri sia vivodaŭro) li trovis la familian feliĉon, edziĝinte al italino rusdevena. Laŭ la rememoroj de la proksimuloj, tiuj nemultaj jaroj de la geedza vivo pasis en vere harmonia feliĉo kaj amo, ankaŭ pro naskiĝo de la filino.

Versimile, mi diris ĉion, kion mi volis diri nun pri la lasta Brodskij. Nur unu plia detalo. Certa nun reklamata rusa poeto diris en la intervjuo: “Mi ne konas personojn, kiuj adorlegadas la poezion de Brodskij”. Se mi havus eblecon renkontiĝi kun tiu poeto, mi nepre informus lin pri ekzisto de miloj da adorantoj de Brodskij. Ankaŭ la banalaĵon mi dirus al li: la tempo juĝos!

Mikaelo Bronŝtejn



Kafumado de la poeto kun esperantistoj en Stokholmo, 1992



Iosif Brodskij (1940-1996)

Бабочка

I

Сказать, что ты мертва?
Но ты жила лишь сутки.
Как много грусти в шутке
Творца! едва
могу произнести
"жила" — единство даты
рожденья и когда ты
в моей горсти
рассыпалась, меня
смущает вычесть
одно из двух количеств
в пределах дня.

II

Затем, что дни для нас —
ничто. Всего лишь
ничто. Их не приколешь,
и пищей глаз
не сделаешь: они
на фоне белом,
не обладая телом,
незримы. Дни,
они как ты; верней,
что может весить
уменьшенный раз в десять
один из дней?

III

Сказать, что вовсе нет
тебя? Но что же
в руке моей так схоже

La papilio

I

Mi diru: mortis vi.
Sed vivis vi dum tago!
Tro multas trist' en ago
de la Kreinto. Mi
apenaŭ diras jen:
"vi vivis" - unu dato
por la naskiĝ' kaj fato,
ke en manplen'
polviĝis vi. Do min
dubigas ebla
subtrah' de kvant' kaptebla
en taga lim'.

II

Ĉar tagoj por ni – nul',
nenio. Nura
nenio, tuj forkura,
kaj por okul'
malklara. Dum la vag'
sur fono blanka,
ni ĝin pro l'korpo manka
ne vidas. Tag'
similas vin. Eĉ pli:
ĉu estas pezo
en la dekona peco
de l' tagfoli'?

III

Ĉu dubu mi pri l'esto
via? Sed kio
similas vin sur mia

с тобой? и цвет —
не плод небытия.
По чьей подсказке
и так кладутся краски?
Навряд ли я,
бормочущий комок
слов, чуждых цвету,
вообразить бы эту
палитру смог.

IV

На крылышках твоих
зрачки, ресницы —
красавицы ли, птицы —
обрывки чьих,
скажи мне, это лиц
портрет летучий?
Каких, скажи, твой случай
частиц, крупниц
являет натюрморт:
вещей, плодов ли?
и даже рыбной ловли
трофей простерт.

V

Возможно, ты — пейзаж,
и, взявши лупу,
я обнаружу группу
нимф, пляску, пляж.
Светло ли там, как днем?
иль там уныло,
как ночью? и светило
какое в нем
взошло на небосклон?
чьи в нем фигуры?
Скажи, с какой природы
был сделан он?

VI

Я думаю, что ты —
и то и это:
звезды, лица, предмета
в тебе черты.
Кто был тот ювелир,
что, бровь не хмуря,

manplat'? Ĉu l' vest'
kolora – iluzi'?.
Per kies faroj
tiel metitas farboj?
Apenaŭ mi, -
vortul', pri kolorgam'
scianta ne tro,
imagon pri l' paletro
akirus jam.

IV

Sur via flugilet'
Pupil', brovhirto –
de belulin' aŭ birdo, -
kies portret'
flugeca estas ĝi? –
Do diru veron,
el kiuj grajnoj, eroj
konsistas via plad':
jen frukto, jen nimfeo,
ĉeestas eĉ trofeo
de fiŝkaptad'.

V

Ĉu estas vi pejzaĝ'?
Do tra lupeon
mi vidos grupon fean
dum danc' sur plaĝ'.
Ĉu tie brilas lum',
aŭ nokta vasto
malluma? Kiu astro
ascendis nun
al firmamenta ŝild'?
Kies figuroj
pentritas plej naturaj
en tiu bild'?

VI

Kredeble, ĉio ajn
vi, tamen, restas:
objekt' en vi ĉeestas,
vizaĝ', stelgrajn'.
Do kiu juvelist'
metis sekure

нанес в миниатюре
на них тот мир,
что сводит нас с ума,
берет нас в клещи,
где ты, как мысль о вещи,
мы — вещь сама?

VII

Скажи, зачем узор
такой был даден
тебе всего лишь на день
в краю озер,
чья амальгама впрок
хранит пространство?
А ты — лишает шанса
столь краткий срок
попасть в сачок,
затрепетать в ладони,
в момент погони
пленишь зрачок.

VIII

Ты не ответишь мне
не по причине
застенчивости и не
со зла, и не
затем, что ты мертва.
Жива, мертва ли —
но каждой Божьей твари
как знак родства
дарован голос для
общенья, пеня:
продления мгновенья,
минуты, дня.

IX

А ты — ты лишена
сего залога.
Но, рассуждая строго,
так лучше: на
кой ляд быть у небес
в долгу, в реестре.
Не сокрушайся ж, если
твой век, твой вес
достойны немоты:

sur vin miniature
l' mondon en dist'.
Ĝi ravas nin ĝis trem',
faras kaptaĵo.
En ĝi vi – pens' pri l' aĵo,
ni – l' aĵo mem.

VII

Por kio prenis vi
en lando laga
nur por la daŭro taga
ornamon ĉi?
Lagara amalgam'
la spacon tenas.
Sed vi – l' ŝancon apenaŭ
vi havas por
dum la kelkhor'
ektremi en la polmo,
aŭ ŝvebi por la
pupil-dolor'.

VIII

Vi ne respondos - ne
pro la hontemo,
ne pro koler'-ekstremo
kaj tute ne
pro via jama mort'.
Morta aŭ viva,
sed ĉiu besto Dia
prenas de l' sort'
dotitan voĉon por
eligi l' sentojn:
longigi la momentojn
de l' tag', de l' hor'.

IX

Sed vi – vi restis sen
tiu kaŭcio.
Ja, ekster emocio:
ĉu bonas en
la ŝuldoj resti al
ĉielreganto?
Ne afliktiĝu vante,
se via skal'
mutindas: estas prem'

звук — тоже бремя.
Бесплотнее, чем время,
беззвучней ты.

X

Не ощущая, не
дожив до страха,
ты вьешься легче праха
над клумбой, вне
похожих на тюрьму
с ее удушьем
минувшего с грядущим,
и потому,
когда летишь на луг
желая корму,
приобретает форму
сам воздух вдруг.

XI

Так делает перо,
скользя по глади
расчерченной тетради,
не зная про
судьбу своей строки,
где мудрость, ересь
смешались, но доверяясь
толчкам руки,
в чьих пальцах бьется речь
вполне немая,
не пыль с цветка снимая,
но тяжесть с плеч.

XII

Такая красота
и срок столь краткий,
соединясь, догадкой
кривят уста:
не высказать ясней,
что в самом деле
мир создан был без цели,
а если с ней,
то цель — не мы.
Друг-энтомолог,
для света нет иголок
и нет для тьмы.

eĉ sono klara.
Sed vi 'stas pli senkarna
ol tempo mem.

X

Ne ĝisvivinta eĉ
senton de l'timo,
vi ŝvebas en proksimo
de l' bed' sen streĉ',
ekster pasea vok',
ekster estonto,
similaj al prizono,
ties sufok'.
Do, se al kampa ter',
al mangĝ' vi iras,
la formon ekakiras
mem la aer'.

XI

Jen ago de skribil'
sur glato glita
de l' paĝo liniita
sen scio pri l'
destino de l' skribaĵ'
kun saĝ', herezo,
miksitaĵ, sed kun kredo
al mana paŝ',
en kies fingroj mut'
de l' diro venas,
ne florpolenon prenas, -
lacon en tut'.

XII

Pro l' belo en uni'
kun viv-mallozo
la lipojn per supozo
kripligas mi,
ke evidentas nun
klara respondo
sen cel' kreitas mondo,
sed se eĉ kun, -
ne estas ni la cel'.
Spertul' fidinda,
por lum' ne estas pingloj,
nek por malhel'.

XIII

Сказать тебе "Прощай"
как форме суток?
Есть люди, чей рассудок
стрижет лишай
забвенья; но взгляни:
тому виною
лишь то, что за спиною
у них не дни
с постелью на двоих,
не сны дремучи,
не прошлое — но тучи
сестер твоих!

XIV


Ты лучше, чем Ничто.
Верней: ты ближе
и зримее. Внутри же
на все на сто
ты родственна ему.
В твоём полете
оно достигло плоти;
и потому
ты в сутолке дневной
достойна взгляда
как легкая преграда
меж ним и мной.
1972

XIII

Ĉu diri estas senc',
al vi "Adiaŭ"?
En certaj hommedioj,
tondadas mens'
likenon de l' forges',
sed tion kaŭzas
nur fakto ke antaŭas
ne taga pez'
kun lit' duopa nur,
songoj pasiaj,
sed de fratinoj viaj
la nuba spur'.

XIV

Ja vi pli bonas ol
Neni'. Pli ĝuste:
pli ĉeas. Sed enbruste
parencas al
Nenio. Certe, ĉar
vinflug' altigis,
Nenio vin atingis
en via karn'.
Do en tagbruo vi
Estas vidinda
kiel bareto inter
Neni' kaj mi.
1972





Konstantin Simonov (1915-1979)

Мальчик

Когда твоя тяжелая машина
Пошла к земле, ломаясь и гремя,
И черный столб взбешенного бензина
Поднялся над кабиною стоймя,
Сжимая руль в огне последней
вспышки,
Разбитый и притиснутый к земле,
Конечно, ты не думал о мальчишке,
Который жил в Клину или Орле:
Как ты, не знавший головокруженья,
Как ты, он был упрям, драчлив и смел,
И самое прямое отношеньё
К тебе, в тот день погибшему, имел.

Пятнадцать лет он медленно и твердо
Лез в небеса, упрямо сжав штурвал,
И все тобой не взятые рекорды
Он дерзкою рукой завоевал.
Когда его тяжелая машина
Перед посадкой встала на дыбы
И, как жестянка, сплющилась кабина,
Задев за телеграфные столбы,
Сжимая руль в огне последней
вспышки,
Придавленный к обугленной траве,
Он тоже не подумал о мальчишке,
Который рос в Чите или в Москве...

Когда уже известно, что в газетах
Назавтра будет черная кайма,
Мне хочется, поднявшись до рассвета,
Врываться в незнакомые дома,
Искать ту неизвестную квартиру,
Где спит, уже витая в облаках,
Мальчишка — рыжий маленький
задира,
Весь в ссадинах, веснушках, синяках.

1939

Knabo

En horo, kiam via flugmaŝino
Detruigante klinis al la ter',
Kaj nigra spur' brulanta de benzino
Ekstaris, kvazaŭ fosto, en aer'
Dum lasta fulm' kaj flam', post lasta
frapo,
Premita al la fundo de ravin',
Vi, certe, ne ekpensis pri la knabo,
Loĝanta en Orjolo aŭ en Klin'.
Kuraĝa, batalema, energia,
Sen sento de vertiĝo en aer' —
Li estis kvazaŭ vi, mortinta tiam,
En multaj trajtoj en la karakter'.

Li dek kvin jarojn grimpis en ĉielon,
Premante la stirilon kun obstin',
Aŭdace li atingis ĉiun celon,
Rekordojn, ne ĝisatendintajn vin.
Kaj kiam lia peza flugmaŝino
Ekbaŭmis, kvazaŭ staris sur la vost',
Kun krako deformiĝis la kabino
Post bato kontraŭ telegrafa fost',
Dum lasta fulm' kaj flam', post lasta
frapo,
Rompita, sur brulinta nigra gren',
Li same ne ekpensis pri la knabo,
Loĝanta en Kazano aŭ Tjumen'.

Se mi jam scias, ke funebra noto
Matene ekaperos en gazet',
Mi volas, vekigiĝinte dum la nokto,
Penetri fremdajn pordojn pro impet'
Eltrovi, kie estas tiu domo,
La ĉambro, kie dormas en angul',
Flugante en la sonĝo, eta homo,
Skrapvunda, rufa, vila, petolul'.

***Esperantigis Aleksandro Mitin,
Nijnij Novgorod (12–21.03.2020)***



Valerij Brjusov (1873-1924)

Старый викинг

Он встал на утесе; в лицо ему ветер
суровый
Бросал, насмехаясь, колючими
брызгами пены.
И вал возносился и рушился,
белоголовый,
И море стучало у ног о гранитные
стены.

Под ветром уклончивым парус
скользил на просторе,
К Винландии внук его правил свой
бег непреклонный.
И с каждым мгновеньем меж ними
все ширилось море,
А голос морской разносился, как
воплъ похоронный.

Там, там за простором воды
неисчерпно-обильной,
Где Скрелингов остров, вновь грянут
губящие битвы,
Ему же коснеть безопасно под
кровлей могильной,
Да слушать, как женщины робко
лепечут молитвы!

О, горе, кто видел, как дети детей
уплывают
В страну, недоступную больше мечу
и победам!
Кого и напевы военных рогов не
сзывают,

Кто должен мириться со славой,

Maljuna vikingo

Li staris sur klifo. Vizaĝen la vento
rigora
Ĵetadis, mokante, pikilojn de ŝaŭmaj
ŝprucetoj.
Ondeg' suprenflugis kaj falis je l'kap'
neĝkolora,
Kaj maro frapadis graniton ĉe liaj
piedoj.

Sub vento klinema la vel' en vastaj'
foren glitis.
Vinlanden* sin gvidis la nep' en
l'impet' nefleksebla.
Kaj sin de la nep' ĉiam pli
malproksima li vidis,
Kaj voĉo de maro similis al krio
funebra.

Ho, tie, post vastoj de akvo abunda
senfine,
Ĉe Skreling-insulo** retondros
mortigaj bataloj,
Dum sub la tombea tegment' li
vegetos rutine
Kaj aŭdos timidajn preĝvortojn en
sombraj realoj.

Ho ve al vidintoj de siaj infanoj foriri
Al lando ne plu atingebla por venkoj
kaj glavoj,
Se kantoj de kornoj militaj ne vokas
inspiri
Al gloro, jam rezignacie cedita al avoj.

Mi estu por nova batal' ĉiam homo

уступленной дедам.
Хочу навсегда быть желанным и
сильным для боя,
Чтоб не были тяжки гранитные,
косные стены,
Когда уплывает корабль среди шума
и воя
И ветер в лицо нам швыряется
брызгами пены.

bonvena,
Granito de klifo rutina ne fortu
korpreme,
Se ŝip' fornavigas laŭ maro muĝanta ,
bruplena
Kaj vento jetadas vizaĝen ŝprucegojn
ŝaŭmtreme.

1900

Traduko de Klara Ilutoviĉ

- * Vinlando – tiel vikingoj nomis orientan bordon de la Norda Ameriko, malkovrita de ili antaŭ Kolumbo.
- ** Skreling-insulo – tiel normanoj nomis unu el lokoj de la Norda Ameriko, malkovrita de ili fine de la X-a jarcento.



Historio kaj nuntempo

Pri vino, vinfarado kaj vinfaristoj

Tatjana Auderskaja, Odeso



Vino estas plej bela homa trinkaĵo. Ĝi estas bongusta, feliĉigas animon kaj donas al organismo necesajn organikajn substancojn, da kiuj enhavas pli ol 600. En eŭropa mezepoko oni trinkis diluitan vinon, ĉar ne konis aliajn trinkaĵojn: nek teon, nek kafon; ne imagis pri fruktaj suktoj, ne kutimis trinki freŝan aŭ acidigitan laktan, ne manĝis fruktojn... Do, fakte la sola fonto de mineraloj kaj organikaj acidoj por tiamaj homoj estis nur vino: ĝi ja entenas 24 mikroelementojn kaj vitaminojn C, B1, B2, B6, B12, P, PP. Vino havas ankaŭ fortajn kontraŭbakteriajn ecojn, kaj estis uzata tiel dum epidemioj kaj simple por kuracado.

Certe, homoj jam delonge komprenis ĝian utilon, kaj komencis speciale kreskigi vitojn en varmaj landoj. En malvarmaj landoj ili ne kreskas, bedaŭrinde, kaj tie oni devas konsumi ĉiam flavan amaran bieron:-). Sed ĉe ni, feliĉe, la klimato favoras vitkultivadon, kaj oni produktas vinon kaj en specialaj entreprenoj, kaj simple en propraj kortoj kaj malgrandaj vinberejoj. Pri unu vinfaristo kaj unu vinfara institucio mi volas rakonti.



Iam sur Britaj insuloj, ie en Skotlando aŭ en Anglio vivis la familio Garnett. Pro la milito de Ruĝa kaj Blanka Rozoj parto de la familio translokiĝis al Nederlando, poste al Pollando, kaj en 1570 iu Petro Gernet jam estis magistratestro de

urbo **Goleniów**. Lia pra-pranepo fariĝas urbestro de Tallinn, lia filo Karl-Kristof estas la gentopatro de la odesa branĉo de la familio. Li partoprenis la kontraŭnapoleonan militon de 1812, poste oficis en Komerca banko. Lia posteulo Aleksandr estis sekretario de odesa urbestro. Li aktive helpis al la kontraŭcarisma movado "Popola volo" (Narodnaja vola), kaj estis ekzilita al Orienta Siberio por 6 jaroj.



Mortis li en Odessa en 1893.

Kaj fin-fine ni venas al la ĉefa persono de nia rakonto, Vladimir Aleksandroviĉ Gernet. Li naskiĝis en 1870, same kiel la patro partoprenis la fruan revolucion movadon, pro kio en 1892 estis eksigita el la naturscienca fakao de la fizik-matematika fakultato de Novrusia (Odesa) universitato. Nur en 1898 г. li sukcesis reveni kaj trapasis finajn ekzamenojn kun la diplomo de la grado. Okupiĝis pri kemio de vino en Odesa kemia laboratorio, poste fariĝis la laboratoriestro. Estis fama en la urbo kiel konstanta batalanto kontraŭ falsado de manĝaĵoj kaj precipe de vinoj. En 1910 V. E. Tairov invitas lin al Vinfarista stacio de rusiaj vitkultivistoj kaj vinfaristoj, kies direktoro V. A. Gernet fariĝas. Ekde 1899 г. li publikigis artikolojn en “Heroldo de vinfarado” («Вестник



виноделия»), ekde 1926 membras en la redakta kolegio de tiu revuo. Li ankaŭ kunredaktis la revuon “Heroldo de eksperimenta fiziko kaj elementa matematiko”, kie publikigis sciencajn artikolojn. En 1904-1906 li instruis kemion en Komerca lernejo de Fajg, gvidis kursojn de *enoĥemio*² en Superaj kursoj ĉe la Vinfarista stacio. Lia scienca laboro koncernis la elekton de la plej konvenaj lokoj por kultivado de certaj specoj de vinberujoj, kio estas tre grava problemo nun, sed antaŭ cent jaroj oni ankoraŭ ne asignis al ĝi sufiĉan atenton. Li komprenis kaj komprenigis vinfaristojn, ke la ĉefa tasko estas produkti la plej bonajn vinojn konforme al la lokaj kondiĉoj (tio, kio nun estas konata

kiel *terroir*³). Li okupiĝis ankaŭ pri la problemoj de kunigebleco de bazotrunko kaj greftaĵo, pri hibridoj, pri genetiko de vito, kio estis tute nova en tiu epoko. Estis aŭtoro de pli ol 80 artikoloj pri diversaj problemoj de enologio, de la libro “Analizo de vino” (Odessa, 1910) kaj ĉefa aŭtoro de “Gvidlibro pri analizo de vinbera vino” (Odessa, 1915).

Sed li ne estis unuflanka sciencisto. Liaj interesoj estis diversaj: matematiko, meteologio (tiel grava por vitkultivistoj), filozofio, literaturo. Li amikis kun famaj verkistoj A. I. Kuprin, I. A. Bunin. Bunin dum du sezonoj (1901 kaj 1902) loĝis en somerdomo de Gernet en Odesa ripozdistrikto Granda Fontano. Kaj laŭ la familiaj rememoroj, ĝuste Gernet montris al Kuprin tiun bierejon “Gambrinus”, kiun la verkisto poste eternigis en sia fama rakonto.

² Enoĥemio – aplika scienco pri hemiaj ecoj de vino.

³ Terroir [teruar] – franca termino, signifanta это сочетание природных условий, в которых растёт виноград и которые определяют букет и потенциал вина перед его выдержкой

Sed ni konas V. A. Gerneton pro alia, tre grava parto de lia vivagado: li estis esperantisto!

Li korespondis kun L. Zamenhof, estis sekretario kaj unua gvidanto de Odesa Societo de esperantistoj “Espero” (1894-1897), subvenciis eldonadon de la gazeto “Lingvo internacia”, eldonata en Uppsala (Svedio); estis ĉefredaktoro de tiu gazeto en 1895-1897. Tie estis publikigitaj liaj tradukoj de verkoj de V. G. Korolenko (“Fantomoj”, 1895) kaj de H. Heine (“Pentraĵoj el vojaĝo”, 1897, kune kun A. Kofman). La 12an de julio 2011 en Odesa Instituto de vitkulturado kaj vinfarado “V. Je. Tairov” estis solene inaŭgurita memortabulo al V. A. Gernet kun la teksto en du lingvoj, la rusa kaj Esperanto:

VLADIMIR ALEKSANDROVIĈ GERNET (1870-1929)
UNUA GVIDANTO DE VINOLOGIA STACIO DE RUSIAJ VINBERISTOJ
KAJ VINFARISTOJ (1910-1921)
HONORA CIVITANO DE ODESSA
FONDINTO DE UNUA ODESA ESPERANTO-KLUBO (1894)
PIONIRO DE ESPERANTA MOVADO



La memortabulo kun bareliefo de V. Gernet estis kreita de juna odesa skulptisto Maksim Babkin.

Vladimir Aleksandroviĉ Gernet forpasis en 1929 sur la posteno de direktoro de la Instituto de vitkulturado kaj vinfarado, kaj estis enterigita je la ŝtata konto omaĝe al liaj grandaj sciencaj meritoj.

Sed la scienca institucio, kiun li gvidis, ekzistas ĝis nun, kaj nomiĝas jam: Nacia Scienca Centro «Instituto de vitkultivado kaj vinfarado je la nomo de V. E. Tairov». La 16an de aŭgusto 2020 ni decidis aliĝi al tutmonda evento “Paralela Universo” kaj okazigi renkonton de la tri odesaj kluboj: “Blanka Akacio”, “Verdaĵo”, “Verda Lampo” kaj de Lucka klubo «Arbara Kanto». Ni havis tre interesan ekskurson tra la Instituto, ĝia Muzeo, abunda biblioteko kun



valoraj antikvaj libroj, vinkelo, gustumada halo. Oni rakontis, kiujn vinojn produktas la Centro nun, kiel endas zorgi pri vitoj, kiel oni konservas vinon en keloj, kion “ŝatas” kaj “ne ŝatas” vitoj kaj vinoj; montris modelojn de maŝinoj por rikolti vinberojn kaj pokalojn, kiujn ricevis la Centro mondscale. En la biblioteko ni vidis antikvajjn librojn pri vino kaj vinfarado, iuj eĉ de la 18a jarcento. Speciale oni omaĝas tie la memoron de V. A. Gernet: en la biblioteko troviĝas lia memorangulo kun fotoj kaj malnovaj eldonaĵoj.


Tamen, “prefere unufoje ekvidi, ol centfoje ekaŭdi”, ĉu ne? Tial mi invitas sekvi nin en tiu vere alloga ekskurso.



Libro, bedaŭrinde malgrandkvante eldonita



Inter iamaj rusiaj aktivaj esperantistoj estas tiuj, kiuj fariĝis profesiaj rusaj verkistoj (Ivan Naumov, Grigorij Arosev, kaj ne nur...). Tamen, en iliaj verkoj ial tute ne rolas Esperanto kaj esperantistoj... Nun antaŭ ni estas mala ekzemplo – beletra libro de sufiĉe konata esperantisto el Nijnij Novgorod Igor Simonov (kies artikoloj pri Esperanto foj-foje aperadis en sciencaj eldonoj, kio ja ne estas tro ofta fenomeno en nia lando; en 2000 li eldonis esperantlingvan tradukon de “Aelita” far A. N. Tokstoj), eldonita ial sub neniun trompanta pseŭdonimo Igor Aretano, en kiu esperantistoj kaj Esperanto reale rolas. Kaj jam pro tio la libro meritas atenton.



Tio estas detektivromano, kies enhavon en recenzo rakonti ne licas, ni nur diru, ke temas pri private detektivo (eksa policano), en kies agentejo laboras nur li kaj la helpantino. Nu, sufiĉe konata literature situacio... Ili devas trovi iun malaperintan negociston, kiu, hazarde, estas esperantisto, aktivulo de la loka klubo, kaj kiu eĉ skribis taglibron en Esperanto. Do, tio estas la ĉefa preteksto por klarigi al la legantoj ion pri Esperanto. Informoj pri Esperanto estas abundaj, ne tiom en la teksto, kiom en abundaj finaj notoj. Unu noto eĉ plene reproduktas enciklopedian artikolon far Viktor Grigorjev el “Mallonga literature enciklopedio”! Estas klarigoj kaj pri Esperanto-kulturo, pri deversaj ideologiaj tendencoj en la

movado, eĉ, okaze de mencio de tiu fenomeno, estas granda noto pri esenco de raŭmismo! Do, kontiĝante kun detektiva enhavo, la leganto intercetere konatiĝas kun certaj trajtoj de la lingvo kaj koncernaj komunumo kaj kulturo! Ne malgravas ankaŭ prezentoj de opinioj de kontraŭuloj de Esperanto, kiuj estas personigitaj kiel ekstrema naciisto, esprimanta malamon al ĉio, kio ne enhavas konkretan nacian etoson.

Esperanto ludas rolon ne nur en la enhavo – mi eĉ diru, ke por la enhavo ĉeesto de Esperanto ne nepras, ja la serĉata persono povus kun la sama logiko esti amatora aktoro, ŝakisto aŭ alispeca hobiulo, kaj la taglibron skribi en alia lingvo. (El tio sekvas, ke la ĉefa tasko de la aŭtoro estis ĝuste prezenti Esperanton en leĝera, senaltruda formo). Jam sur la kovrilpaĝo ni legas, kiel subtitolon: “Ruslingva krima-romantika detektivromano, en kiu agas esperantistoj” – en Esperanto! Kaj ĉiuj ĉapitroj (krom unu rumanlingva escepto) estas esperantlingvaj, prezentantaj aŭ iun proverbon el la Zamenhofa proverbaro, aŭ iuj faman esprimoncitaĵon (“Fajron sentas mi interne”, ks.). Kompreneble, tradukojn de tiuj ĉapitrotitoloj la leganto serĉu en finaj noto. Tiel oni vidas la realajn frazojn en la Lingvo internacia, kaj, ĉe deziro, povas provi iom kompreni la strukturon de la lingvo.

Intereso de la libro ne elĉerpiĝas nur pro tiu lingvo-propoganda flanko. Tre interesaj estas ankaŭ la loko kaj tempo, kiam okazas la eventoj. Tio estas 1992 jaro en iu (!) nordmoldavia urbo (tute evidente – Bălți [Бэлць, Бельцы] – simple pro tio, ke en Norda Moldavio aliaj signifaj urboj ne ekzistas). Tiam ĵus finiĝis interna milito, kiu finiĝis je apartiĝo de Moldavio de la Transdnestra region, kaj daŭris diversaj nefinsolvitaj diskutoj pri sameco/malsameco de la moldava kaj rumana popoloj kaj lingvoj, ktp. Estas montrata fono de komplikaj interrilatoj inter diversaj etnaj grupoj, loĝantaj en Moldavio, ktp., ktp. Ankaŭ interrilatoj de ĉionpovaj bandoj kaj polico, krima situacio ktp. mergigas nin en la atmosferon de la ardaĵoj 90-aj jaroj, kio por la homoj, kiuj tiam vivis estas en si mem interesa same, kiel por la homoj, kiuj tiun epokon ne travivis!

Iom da kritiko. La romano estas verkita laŭ ĉiuj postuloj de la detektiva ĝenro, kun bona kono de la priskribata medio, kaj legeblas sufiĉe flue, kio estas tre bona laŭdo por beletristo neprofesia – pluraj nuntempaj detektivaĵoj tute ne pli bonas stile. Tamen, ĝi ne elstaras, kaj iuj turnoj de la eventoj estas prezentataj ne tro konvinke, special en la romantika linio. Estas kelkaj lingvaj eraretoj, kiuj povas inciti tro postuleman kritikiston, kiel mi: mikso de “necesi” kaj “bezoni” en unu esperanta frazo, fifama «одеть» anstataŭ «надеть» en la rusaj...

Nu, tamen, se ne okupiĝi pri la troa harfendado, la aŭtoro plenumis sian taskon prezenti en beletra distra formo iujn sociajn kaj ceterajn ideojn, uzante modelon de Ĉernyševskij en “Kion fari?”, tute kontentige. Bedaŭrinde nur, ke tiu ĉi detektivaĵo, propagandanta Esperanton, ne estas eldonita amase, kiel arte samnivelaj detektivaĵoj de kelkaj popularaj aŭtoroj!

Nikolao Gudskov

Игорь Аретано. ТАРАФ. Криминально-романтический детектив с лингвистическими мотивами. Нижний Новгород: ООО «Печатная мастерская «Радонеж». 2020 г. 320 с.

ISBN 978-5-6045649-0-5.

Dezirantoj akiri la libron, konsideru, ke tio eblas:

- por aĉeti elektronan ekzempleron:

<https://ridero.ru/books/taraf>

196 rublojn


- por aĉeti paperan ekzempleron (350 rublojn inkluzive poŝtelspezojn) skribu al la aŭtoro:

aretano.taraf@gmail.com

Io devas okazi: literatura suplemento al La Ondo

Korotkov, Miĥail Gavriloviĉ. *Io devas okazi: Rakontoj, fabeloj, pripensoj* / Postparolo de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2020. — 117 pagoj. — (Literatura suplemento al *La Ondo de Esperanto*, 2020).

La 30an de januaro aperis, kiel literatura suplemento al *La Ondo de Esperanto*, la bitlibro *Io devas okazi* de la Siberia aŭtoro Miĥail Korotkov. Ĝi estas publikigita en la prezentoformoj “pdf” kaj “ePub”.



Miĥail eklemis Esperanton en 1979, sed li neniam aktivis movade, preferante legi, traduki kaj verki. Ekde la 1985a jaro liaj originalaj rakontoj ekaperis en la samizdata (= eldonita neleĝe, t. e.: ekstercenzure kaj senimposte) almanako *Sezonoj*, kaj en 1988 ĉe la samnoma samizdata eldonejo aperis lia 88-paĝa kolekto *Homo, kiu mortigis*, kiu estas la unua sciencfikcia kaj fantasta libro en Esperanto eldonita en Sovetunio/Ruslando.

Ses rakontoj de *Homo, kiu mortigis* reaperas en *Io devas okazi*. Ilin komplementas

ok verkoj, intertempe aperintaj en la almanako *Sezonoj* (1) kaj en *La Ondo de Esperanto* (7) kaj kvar diverstempe verkitaj tekstoj, kiuj ĝis nun ne estis publikigitaj.

La literaturan suplementon senpage ricevas ĉiuj abonantoj de *La Ondo de Esperanto*, do, se vi volas tralegi la libron *Io devas okazi*, bonvolu aboni la almanakon por 2021. La abonantoj rajtas ricevi ankaŭ la abonkolektojn kaj literaturajn suplementojn por 2019 kaj 2020.

La Ondo de Esperanto estas abonebla kontraŭ 15 eŭroj ĉe niaj perantoj en pluraj landoj, ĉe nia UEA-konto “avko-u” (du preferindaj manieroj) kaj ĉe la internacia pagosistemo “PayPal”. Pri la pagmanieroj



legu ĉe <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

*Halina Gorecka,
Aleksander Korĵenkov*

La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2021/01/ondo-75>

Antologia skizo de la persa literaturo



Impeto ĵus aperigis novan libron:
Said Baluči

Antologia skizo de la persa literaturo

Tradukoj kaj klarigoj de:
Prozspecimenoj de 33 aŭtoroj aŭ libroj (102)

Poemspecimenoj de 24 poetoj

Serio Oriento-Okcidento, n-ro 58
Sub Aŭspicioj de UEA en
Konsulta Partnereco kun Unesko

Provlegis Rob Moerbeek
Respondecaj redaktoroj Dmitrij
Ŝevĉenko, Anna Striganova

Moskvo, Impeto, 2021. — 164 p.

Tiu ĉi libro aperis ne nur
paperforme, sed ankaŭ
bitforme. Ĝin eblas senpage
elŝuti en la retejo de eldonejo
"Impeto" ĉi-tie:

<http://persa.trovu.com/>

Video, kiu prezentas la libron
aperis ĉe jutubo:

<https://www.youtube.com/watch?v=TCpI2iHFtLU>

Retrospektivante la jaron 2020, la unuan jaron de la "granda sankrizo" kaj la 28-an jaron de la eldonejo "Impeto", eblas konkludi, ke la eldonejo daŭre funkcias kaj en la stabila ritmo eldonas Esperantajn librojn.

Pasintjare estis eldonitaj 4, kio estas nemalbona averaĝa rezulto:

1. Mikaelo Bronŝtejn. **Lecionoj por viro. Noveloj.** Originale verkitaj en Esperanto.
2. Leonid Andreev. **Rakonto pri sep pendumitoj.** El la rusa tradukis Anna Striganova.
3. Mark Fettes. **Ne estas fido nur. Elektitaj artikoloj kaj paroladoj el la jaroj 2010–2019.**
4. **Internacia Kongresa Universitato 2020.** Redaktis Anna Striganova, Dmitrij Ŝevĉenko, Amri Wandel.

La lastajn du vi povas elŝuti senpage aŭ/kaj mendi en la retvendejo de "Impeto" (en Rusio) aŭ aliaj libroservoj. Pliaj informoj ĉe:

Dima kaj Anna



Konkursoj

“KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin”

Interkultura Novelo-Konkurso (INK) estas konkurso organizata de Akademio Literatura de Esperanto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio, celanta instigi aktualan novelan kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj. Sama temo, malsamaj vidpunktoj, malsamaj

historioj...

La temo de la konkurso estis voĉdonita rete: “**KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin**”. Aŭtoroj estas nun invitataj verki novelojn pri ĉi tiu temo kaj sendi ilin per reta formularo antaŭ la 20-a de junio 2021.

Pensu: la nova koronaviruso, kiel ĝi ŝanĝis vian vivon aŭ la mondon? Per ĉi tiu temo, vi povas trovi inspiron por skribi fikcian rakonton okazantan en la pasinto (dum la unuaj – kelkfoje frenezaj – monatoj de la pandemio), nuntempe (kiam pandemio iĝis preskaŭ kutima afero de la vivo) aŭ en la estonto (post jaroj, jardekoj aŭ eĉ pli... kia estos nia mondo?)

La tekstoj havos maksimume 12 000 karaktrojn (proksimume 6 paĝoj). Ne estas minimuma longeco. Poste, interkultura ĵurio taksos la novelojn kaj anoncos gajnintojn dum la 107a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio en Montrealo, somere 2022. La aŭtoroj de la tri gajnintaj noveloj ricevos premion de 500, 300 kaj 200 eŭroj, respektive. Finalistajn novelojn oni povos legi en rete publikigota novelaro.

Ĉu vi ŝatas literaturon, novelojn, novelkonkursojn, INK-on? Ni volas aŭdi pri vi!

Akademio Literatura de Esperanto

www.akademio-literatura.org

info@akademio-literatura.org

Humuro

Oftuŝkoj (Popolaj strofetoj)

Stepano N., vilaĝo Vipurovo



Oj, malsan' terura venis,
Mi pro timo tuj eksvenis!
Oj, terura malsaneg' –
Ĉiuj tuj al ĉerkoj ek!

Vi ne restu sen vakcino,
Ĉar sen ĝi alvenos fino
Al labor' kaj al ripoz'.
Agu laŭ l'ordon' de BO3*!

Sekvu vortojn de la mastroj
Por ne trafu vin disastroj!
Gardu lingvon de patroj',
Ĉar aliel velkos 'uj'!

Kantas ni en nia rondo
En freneza nia mondo.
Rido nepre savos nin,
Estas justa la destin'!

30 de januaro, 2021

* BO3 (sonas VOZ) – ruslitera siglo por Tutmonda Sanprotekta organizo

Muzo de Esperanta poezio.

Nikolao Neĉajev, Irkutsko

Muzo havas verdan robon,
Ŝi vizitas teran globon.
Muzo flugas al poetoj
Kun inspiro, epitetoj,
Rimoj, ritmoj, metaforoj
Por ke floru verse l' koroj.

Nun ĉe mia vazistaso
Kun botel' da friska kvaso.
Mian muzon mi atendas,
Mondan gloron mi pretendas.
Muzo metu en la koron
Epiteton, metaforon,
Muzo metu en l' animon
Temon fajnan, ritmon, rimon.
Poezion altoklasan
Muzo kreos. Friskon kvasan
Muzo trinkos. Tiel dankos
Muzon mi...

Revoj, revoj... ili dolĉas,
Ili mian koron sorĉas.
Ĝus mi kreis la poemon.
Mia koro havas tremon:
"Ĉu ricevos en Razgrado
Mi premion pro kreado?"



NdlR: la poemo ja ricevis la duan premion en konkurso de EKRA. Branĉo humuro. ©

CERBE kaj KORE

n-ro 18 (86), februaro 2021

Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 117

"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio
*Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de
ĝusta indiko de la fonto*

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj sciencopopularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru.

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 12.02.2021